EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ilei · IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 59> • AMO 93, 94 kaj plio • Zimbabvo • Ekzamenoj • UMEA < okt 24**

# AMO 93 kun IKEF

Ĉi tiu seminario havas la temon 'Eŭrazia Komerca Komunumo'. La seminarion prizorgas IKEF el Japanio, per Zoom. Krome ĝi disiras per la azia Voov.. Ni alkroĉas la enkondukon de SMG al la seminario, kiu emfazas la en- kaj inter-kontinentan kunlaboron tra la jardekoj. Post la seminario ni raportos pliajn enhavojn.

# AMO 94 kun la kolektistoj

Ĉi tiu seminario okazos en la 28-a kaj 29-a de oktobro, kunlabore kun la aktiva faka asocio de UEA por kolektemuloj. Ni alkroĉas la ampleksan programon kun bonegaj kontribuantoj. Ĝi enhavas kontribuojn el la muzeo de Ĉeĥio en Svitavy, la prezidanto de IKEF, la muzeo en Vieno, la nacia biblioteko en Zagreb, Mirejo Grosjean pri CDELI, la brazila fako de UEA (ELF-AREK), Ĝiaj arĥivoj estas en Triesto, kaj la organizanto estas Elda Doerfler. Ni alkroĉas la programon.

//AMO 94

# AMO 95 kaj 98 kaj sekvajare

AMO 95 okazos en Zagrebo, Kroatio, en novembro 11-14 pri vortara farado.

AMO 96 okazos en Senegalo fine de decembro kun la temo Ínterafrika kunlaboro.

===========

Ni jam laboras aktive por fiksi la enhavon de AMO 97 ĝis 100, kiu okazos frue en 2023.



## IKEF pri edukado el Mongolio

Jen la prezento de la prezidanto de IKEF, Ĉielismo, Wang Tianyi. Ĝi skizas eblojn por pli profesia edukado en la komerca faka asocio de UEA. Tio disvolviĝis kadre de la somera seminario de IKEF en Mongolio.

Vidu la alkroĉitan PDF-prezentaĵon. (IKEF edu

## Kurso de konata rusa esperantistino

Post sukcesa ĉi-jara reta E-kurso komenciĝas nova sesio de Esperanto-kursoj, kiuj estos efektivigataj kun subteno de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ene de 4-5 monatoj en *Zoom*-programo. Ĉiuj dezirantoj, kiuj ankoraŭ ne lernis la lingvon, kaj tiuj, kiuj jam havas bazajn sciojn de Esperanto kaj ŝatus daŭrigi lerni ĝin, estas invitataj al la lecionoj, kiuj okazos la **22-an de oktobro** (sabato) je la 13.30 h.(moskva tempo) – BAZA KURSO, kaj je la 17 h. (moskva tempo) – MEZGRADA KURSO. Daŭro de ĉiu leciono – 2 h. unu fojon semajne. Por ricevi pliajn informojn nepras plenigi enketilon, kiun eblas ricevi laŭ retpoŝto: **esperanto-kurso@mail.ru**

Lecionojn gvidas instruistino pri fremdaj lingvoj, membro de UEA, Loskutova Tatjana Georgijevna (multjara sperto de E-instruado en Rusio kaj ekterlande).

## Zimbabvo petas ricevi librojn

La venonta lernada agado baldaŭ okazos post unu semajno pri la komencantoj kun la malnovaj studentoj kiuj ĵus finis la elementan kurson, sed ekzistas obstaklo: verdire ni malfacile finas la antaŭan studjaron kiu disponis ok monatojn da kursoj sen uzeblaj materialoj (libroj) kun aliaj rilataj bezonoj. La klasĉambro estas atingebla ĉiun semajnon dum tri tagoj, la seĝoj estas prenitaj el la preĝejo. Ni planas denove elekti novajn studentojn pere de publikigo da afiŝoj. Tial mi do proponas al la estraro kunlabori konkrete pri la afero. Jen mia poŝtadreso kaj telefono.

Tongogara post office
P.O. Box 228, Chipinge, Zimbabvo
Telefono: +263719444108, rete: benjaminkas52@gmail.com

Benjamin Kabwe

## Ekzamenoj refoje en Subotica

En la revuo Juna Amiko 3/2022 (septembra numero) aperis artikolo de niaj du junulinoj – Anđela BOGDANOVIĆ (Kragujevac) kaj Blanka LASLO (Subotica) – pri la novformaj, retaj KER-ekzamenoj pri Esperanto. La fonto de la ilustraĵoj en la artikolo estas edukado.net. Mi kun ĝojo resumas ke ĝis nun en Serbio entute 22 personoj ekzameniĝis laŭ la KER-sistemo, je diversaj niveloj (B1, B2, C1) kaj tipoj (skriba/parola/kompleksa), kaj ili kune havas 34 KER-atestilojn (iuj havas 2 kaj eĉ 3 atestilojn, ĉar ili ekzameniĝis je diversaj niveloj kaj/aŭ tipoj). Subotica troviĝas en la nordo de Serbio, en dulingva parto de la lando. La lernejo, kie okazis la ekzamenoj ja estas dulingva: hungara kaj serba.

Aranka Laslo

## Du kursoj en Francio; unu el Britio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: kurso por progresantoj
Gvidantonomo: Robineau Bruno
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Nantes, Francio
Aldoninto: BRUNO49

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27457

Nomo: Kurso por komencantoj en Parizo
Gvidantonomo: Pierre GAUTHIER
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Parizo, Francio.

Aldoninto: PierreGAUTHIER

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27456

Nomo: Lernu Plu
Gvidantonomo: Maurizio Giacometto ("Rico")
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Barlaston, Britio

Aldoninto: Mao87

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27459

# UMEA laboradas praktike

Ĝoje ni informas Vin, ke pretiĝis la esperanta-slovaka-ukraina medicina interpretisto, tradukhelpilo por interpretistoj kaj aliaj.

Ni citas ĝian postparolon: "Volontuloj de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) kun permeso de la aŭtoroj d-ro Gert Hoyer kaj d-rino Uta Hoyer kompilis tiun ĉi kajeron por helpi la rifuĝintojn de la nuna jarcento.

La Estraro de UMEA dankas pro la altruisma laboro al la aŭtoroj kaj kontribuintoj.

*Oni rajtas individue por ne-komercaj celoj kopii tiujn ĉi tekstojn tiom ofte, kiom necesas.* Por komerca uzo la kopirajto estas ĉe UMEA."

Nia laborgrupo bonege povis uzi la permesitan, esperantlingvan parton, kiel neŭtralan pontolingvon de la eminenta libro de d-ro Gert Hoyer kaj Dd-rino Uta Hoyer: Ärztlicher Dolmetscher, 2., erweiterte Auflage, Johann Ambrosius Barth, Leipzig. La libro estas aĉetebla helpe de musklako al:

: https://www.booklooker.de/B%C3%BCcher/Gert-und-Uta-Hoyer+%C3%84rztlicher-Dolmetscher/id/A02yhEgQ01ZZe ...

La angla, araba, bulgara, ĉeĥa, franca, germana, greka, hispana, hungara, itala, pola, rumana, rusa, sveda, serbo-kroata kaj turka tekstoj de la libro ebligas la

uzadon de nia esperanta-slovaka-ukraina tradukhelpilo en la plej multaj landoj de Eŭropo.

# Vortara farado – utila por AMO 95!

**Kiel verki vortaron?** Jen reta prelego de d-ro Ranga (d-ro PV Ranganayakulu -- https://eo.wikipedia.org/wiki/Ranganayakulu).



Jam de kvar jaroj Ranga kunordigas teamon verki ampleksan vortaron teluguan. Li raportis. SMG: Telugua estas lingvo de suda Barato kaj norda Srilanko, kaj, post la iama milito tie ankaŭ (surprize por mi) en Singapuro, kien fluiĝis multaj fuĝintoj. La afiŝoj en la signapura metroo aperis en kvar lingvoj, tri mi rekonis (ĉinan, anglan kaj malajan. Mi eksciis, ke la kvara lngvo, skrbitan per ekzotika alfabeto, estas la telegua.)

Kiam: vendredon la 21-an de oktobro 2022, 7-8:30 ptm IST (UTC: 13h30-15h00)

Kie: https://meet.google.com/wvc-kmkf-nvo
https://eventaservo.org/e/13de9a

Giri RAO

## Juna amiko valoras la penon!

**Ĝi liveras bonkvalitan enhavon por lernantoj. Abonu nun por 2023!**

**Vizitu la retejon de ILEI, la ligo kiu eldonas la revuon.**

https://www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo

**Tie vi trovos abonilon por *Juna amiko,* kune kun la eblo aliĝi al ILEI.**

========= vortoj: 945 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio, Slovenio kaj aliaj landoj.

Komunikoj ĉiam uzu kiam eble la universalan lingvon de kodigoj, Unikodo, kiu jam ekzistas pli ol 50 jarojn kaj estas facile alirebla!

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.